

Esperanto-Instruista Trejnado **EIT** de ILEI

2017-10-17

UNUJARA EIT KUN KULMINO EN ILEI-KONGRESO 2018

ILEI kunlabore kun Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net (*forvishu spacojn*) proponas **intensan trejniĝon pri instruado de Esperanto dum la 51-a ILEI-kongreso en Madrido.**

La formado konsistas el du partoj: reta preparkurso pri metodiko plus partopreno en seminario kun ĉeestaj atelieroj kaj ekzamenoj.

Reta preparkurso

La reta teoria kurso baziĝas je mallongigita kursmaterialo de RITE (privata kurso de E-duKati, Katalin Kováts, trovebla en la Klerigejo de edukado.net <http://edukado.net/klerigejo/rite>), je ties 26 lecionoj pri metodiko kaj 14 leciona gramatika kurso. Je ambaŭ studobjektoj la unuoj konsistas el teorita parto, testo kaj hejmtaskoj, kiuj estas individue analizataj kaj taksataj. La lastaj lecionoj de metodiko preparas la studantojn al la dumkongrese prezentota modelleciono. La materialo estas ampleksa, necesas plurmonata diligenta studado por trakti la lecionojn kaj plenumi ĉiujn taskojn.

Ĉeesta seminario por praktiko

La teorian retan kurson sekvas dum la kongreso/seminario : 4-taga ĉeesta formado, kun 6-hora programo tage dum la ILEI-kongreso.

En la seminario la partoprenantoj laboras tage en proks. duhora ateliero pri instruado, traktante konkretajn metodikajn taskojn.

En tiu ĉeesta programo okazas ankaŭ la prezento de la 15-minutaj modellecionoj de la kandidatoj. La modellecionojn la kandidatoj prezentos kadre de kurso, kiun gvidos Katalin Kovats, kaj kiun la trejnatroj observas. Ili intervenas laŭplane kun siaj lecioneroj. La prezentoj ĉiutage estas publike traktataj kaj taksataj en la seminario.

Ĉar tage eblos nur maksimume 6 ekzamenlecionoj, la nombro de la seminarianoj povas esti maksimume nur 24.

La sukcesintoj en la teoria reta parto kaj en la praktika seminario surloka ricevos diplomon de ILEI pri la instruado de Esperanto.

Partoprenkondiĉoj

Kono de Esperanto minimume je B2, sed prefere je C1 aŭ C2 niveloj.

La aliĝintoj havos skajpan intervjuon kun Katalin Kovats.

Kosto de la formado: por la partoprintoj de la ILEI-kongreso en 2018 estos 55%-a rabato de la RITE-kursoj

[http://edukado.net/klerigejo/rite/ kotizo](http://edukado.net/klerigejo/rite/kotizo).

Jen la rabatitaj prezoj: Baza kotizo: 200 eŭroj, A-landoj 130 kaj B-landoj 80 eŭroj.

Pri eventuala stipendio la kandidatoj informiĝu ĉe la Landa Asocio, ĉe ILEI aŭ ĉe privatuloj.

Tiu kotizo inkludas la retan kurson, liberan aliron al ĉiuj instrumaterialoj de edukado.net kaj ĉeestan seminarion en la kongresa semajno julie 2018 en Madrido. (La kosto ne inkludas kongresan kotizon, nek la loĝadon kaj manĝojn).

Jamaj studentoj de RITE povas sen plia pago partopreni la praktikan, dumkongresan parton, sed necesas, ke ankaŭ ili anoncu sian intencon frue.

La reta kurso startas la 16-an de oktobro 2017. Aliĝi eblas ĉe rite@edukado.net kun kopio al mirejo.mireille@gmail.com .
